# Informilo

Monata revuo - Maandelijks tijdschrift - 11a j. n-ro 3, apr. 1991

## Estraro

*Prezidanto:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Sekretario:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

*Membroj:* Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk. Tlf. (056) 20 07 96.

Peter Berx, Klein Koosterstraat 17, 3570 Alken. Tlf. (011) 31 26 20.

Jan Bovendeerd, Meidoorn 42/2, 2640 Mortsel. Tlf. (03) 449 50 06.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* Gerrit Berveling, Chris Declerck, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

16a de marto 1991

## 1 Financo kaj planado

Ĉeestas: Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts kaj (parte) Jos Vandebergh.

### 1.1 Ekvilibrigo de la buĝeto

La buĝeto de 1991 estas nun en ekvilibro kaj povas esti prezentata al la posttagmeza Ĝenerala Kunsido.

### 1.2 Unuaj rezultoj de 1991?

Ne jam konataj.

### 1.3 Subvencioj

Surbaze de la decidoj en la antaŭaj kunvenoj, ID elkalkulis kiom la diversaj grupoj de FEL kaj kiom FLEJA (mal)gajnus pro la nova subvencia sistemo. JV deziras amendi la iaman proponon kaj provizore ne ŝanĝi la sistemon: la grupoj daŭre ricevus 150 fr. pro ĉiu paganta membro kaj krome povus ricevi subvencion pro la aktivecoj, aljuĝotan post la ricevo de la ŝtata subvencio de la koncerna jaro. La estraro akceptas, kaj tia antaŭmetos ĝin al la posttagmeza kunsido.

## 2 Administra parto

Ĉeestas: La samaj kvar plus Alex Humet.





### 2.1 Antaŭa protokolo

Neniuj rimarkoj.

### 2.2 Komuna vojaĝo al la UK de UEA en Bergen

ID antaŭmetas flugfolion kiu koncize skizas du vojaĝeblecojn al Bergen: aviadilan vojaĝon kaj aŭtobusetan vojaĝon. Dum la ĝenerala jarkunsido oni disdonos la folion.

La estraro krome decidas, ke Ivo Durwael kaj Jos Vandebergh oficiale reprezentos FEL en la kongreso de Bergen.

### 2.3 Lifto

FEL proponis al Institucio Hodler ŝlosi la lifton de Esperanto-domo en Antverpeno, ekde kiam validos la leĝo pri liftoj (supozeble ekde la 1a de aprilo 1991).

### 2.4 Partopreno FEL/FLEJA en ferioborso

FLEJA organizos standon en ferio-borso por gejunuloj. FEL helpos liverante materialon kaj pretas ankaŭ parte pagi la partoprenkostojn.

### 2.5 Eldona agado

- *Urd Hadda murdita!* (Deck Dorval): preta.
- *Ŝirpecoj de letero al la amata* (Chris Declerck): enpaĝigota.
- *La Fundamento sub lupeo* (Makkink): preta.
- *Renardo la Vulpo*: neniuj novaĵoj.
- *La Komencanto*: neniuj novaĵoj.
- Ni daŭre atendas por la historia libro la antaŭparolon de Claude Gacond. La kompostado de la cetero estas preta. ID informpetos ĉu Ulrich Lins pretas kontroli ĝin.
- *La septaga murdenigmo* (Gates): preta.

- *Sub influo de alkoholo* (Sullivan): akceptita de la komisiono. Kompostata.
- Poemaro de Meva Marron: FEL ne eldonos. .
- Poemaro de Krys Ungar: proponita al la komisiono.

### 2.6 Diversaĵoj

ILEI proponas organizi en Belgio internaciajn ILEI-ekzamenojn. FEL interesiĝas pri la propono. AH respondos.

Brusela firmao "Halbart Express" intencas voki FEL antaŭ la tribunalon, pro rifuzo pagi fakturon. PP opinias ke FEL havas sufiĉajn pruvilojn kaj ne timu jurajn paŝojn. La estraro konsentas provizore ne agi kaj atendi pliajn agojn de la alia partio.

### 2.7 Venontaj kunsidoj

13a de aprilo kaj 8a de junio.

Protokolis PP.

La ĝenerala jarkunveno de FLEJA estas prokrastita al dimanĉe la 30a de junio dum nia semajnfino en EEKLO. Ni kore invitas ĉiujn membrojn ĉeesti.

FLEJA-estrarkunveno la 25an de majo je la 10a horo ĉe Patrick Haerick, Zilverberklaan 25, Wondelgem.



# FEL-estraro: protokolo

13a de aprilo 1991

## 1 Financo kaj planado

Ĉeestas: Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts.

### 1.1 Buĝetkontrolo

Pro komputila paneeto la librotenado malfruas je du tagoj. La spezokonto pro tio ne jam estas preta.

### 1.2 Raporto pri BEF-kunsido

ID komunikas, ke la fondaĵoj de BEF elpagos sian rentumon. FEL devus ricevi 26085 BEF, same kiel APE. EEC ricevus la reston.

### 1.3 Konflikto kun Halbart

Ili ne reagis plu post sia lasta admono.

### 1.4 Subvencipeto

Peto pri subvencio de Iwona Kosieba por siaj kursoj, estas pludonata al la estraro de "La Verda Stelo".

## 2 Administra parto

Ĉeestas: La samaj tri plus Jos Vandebergh, Peter Berx, Jean Pierre Allewaert kaj Alex Humet. Petis senkulpigon Jan Bovendeerd.

## 2.1 Antaŭa protokolo

Ne jam preta.

## 2.2 Taskodivido

La taskodivido estas menciita sur p. 1 de *Informilo* de aprilo 1991.

Reprezentantoj de FEL ekde nun forfalu el la organigramo. La oficejo sendu kompostprovaĵon al ID. La organigramo estu sendita kune kun la venonta *Informilo*.

Korespondaĵoj por FEL daŭre iru al ID per la interna poŝto.

## 2.3 Festoj en Kalmthout

ID klarigas la tutan programon. Ĝi aperos en la maja-junia numero de *Horizontaal*.

## 2.4 Horizontaal dulingva

Tiun ĉi punkton ĉeestas la redaktoro de *Horizontaal*, Guido van Damme. Sekvas vigla diskuto pri la propono de kelkaj membroj en la pasinta membrokunveno aldoni Esperantlingvajn tekstojn al *Horizontaal*. Fine la estraro konkludas kaj rekomendas al la redaktoro integrigi jen kaj jen malgrandan Esperanto-tekston inter la nunaj tiel ke la ne-esperantistoj, al kiu *Horizontaal* ja celas, kaj kiuj estas ties plej granda abonantaro, povu ekkoni kiel Esperanto aspektas.

## 2.5 Studotago pri planlingvoj

FEL estas invitita kunorganizi kaj kunpagi studotagon pri planlingvoj en Suda Nederlando. Invitito pri "Interlingua" jam rifuzis kunpagi sed pretis prelegi. Reprezentanto de "Ido" ne respondis. Nederlanda Esperanto-Asocio rifuzas kunlabori. Surbaze de tiuj ĉi konstatoj ankaŭ FEL ne deziras partopreni kaj ĝi konsilos al la organizantoj nuligi la studotagon.

## 2.6 FEL kaj UEA

Montriĝas ke UEA pli kaj pli akceptas regionajn Esperanto-asociojn malfavore al la iama ideo akcepti nur asociojn de ŝtatoj. FEL ne estas rekonita de UEA kaj administre devas trakti kun UEA tra BEF (kotizoj, kolektivaj abonoj k.s.) kio kondukas al multe da tempoperdo, eraroj, grumblojn de membroj ktp. Unuavide estus do tre utile se FEL povus aliĝi al UEA. La estraro de FEL favoras la ideon kaj antaŭmetos ĝin al la venontaj ĝeneralaj kunsidoj de FEL kaj BEF.

BEF jam de jaroj aĉetas de UEA kvanton da jarkolektoj de *Esperanto* kaj pluvendas ilin al FEL kaj APE, la tiel nomata koletiva abono. UEA nun ŝatus nuligi tiun sistemon. Ankaŭ BEF inklinas al tio, ĉar ĝi estas perdodona. FEL tamen volus konservi la sistemon, kaj rekomendas al BEF en 1992 iom altigi la kotizon tiel ke ĝi ne perdos.

## 2.7 Informado

Denove regule aperas *An update on Esperanto*, informfolio de UEA. La estraro proponas al la redaktoro de *Horizontaal* traduki ĝin por la venonta numero.

La novan Esperanto-dokumenton de UEA "Al unu lingvo por Eŭropo" FEL eldonos nederlandlingve en sia serio de dokumentoj. ID petos al s-ro van Themaat ĉu li pretas traduki ĝin.

## 2.8 Esperanto sur identeckartoj

Senatano Janzegers de Agalev proponis al la koncerna komisiono forigi la anglan lingvon de la Belgaj identeckartoj kaj uzi anstataŭe Esperanton. Li petas al FEL ĉian helpon. JV sendos al li liston de parlamentanoj kaj senatanoj kiuj favoras Esperanton kaj kontaktigos lin kun s-ro Erasmus. JV krome produktos unu identeckarton kun Esperanto-teksto tiel ke eksteruloj aŭ ĵurnalistoj povus vidi kia ĝi aspektas.

## 2.9 Komuna vojaĝo al la UK de UEA en Bergen

Ambaŭ vojaĝoj (aviadila kaj aŭtobusa) okazos. Kiu ankoraŭ ŝatus partopreni urĝe kontaktu la oficejon de FEL.

## 2.10 Lifto

La estraro petas al PP esplori ĉu la nova leĝo nun jam efektiviĝis. Dume la lifto ne plu estas uzata.


2 ADMINISTRA PARTO

# PROTOKOLO PRI LA GENERALA MEMBROKUNVENO DE FEL
16.03.1991

Komenciĝo: 15 00 h.
Senkulpiĝon petis: Gregoire Maertens, Fernand Roose, Mathieu Habex, Jan Bovendeerd, Georges Sossois.
Prezidis: ID kaj PP (por la elektoj).
Fino: 18 15 h.

1. Administra raporto: ID prezentas la sekretarian raporton, kiun vi trovas aliloke.
Ghilain Jacobs esprimas sian kontenton pri la aspekto de Horizontaal, sed trovis 2 erarojn en ĝi.
La raporto estas akceptita.
2. Financa raporto: PP prezentas ĝin. Feliĉe la jaro finiĝas per gajno. Precipe la tipaj FEL-aktivecoj kreskis (eldona agado, varbado, vendo de kursoj kaj aliaj libroj...). Ankaŭ la enspezoj pro eksteraj klientoj konsiderinde kreskis. Sed la enspezoj pro eksterlandaj Esperanto-klientoj malkreskis.
Post kelkaj klarigoj, la raporto estas akceptita.
3. Kontrolo de la listo de administrantoj, kiuj reprezentas la klubojn dum la venonta oficperiodo:
Elektitaj estas:

| | |
|---|---|
| por Aalst: | Hilde Wauters |
| por Antwerpen: | Jan Bovendeerd, Ivo Durwael, Alex Humet, Eddy Van den Bosch |
| por Brugge | vakas |
| por Brussel | Lucien De Sutter |
| por Gent | Katja Lödör, Ingrid Lievens |
| por Halle | Jan Deville |
| por Kalmthout | Edward Symoens |
| por Knokke | Albert Marmenout |
| por Kortrijk | Jan Hanssens, Jean-Pierre Allewaert |
| por Leuven | Marc Vanden Bempt, Ghilain Jacobs |
| por Limburg | Bob Rombaut, Peter Berckx, Mathieu Habex, Jos Vandebergh |
| por Oostende | Raymond Vylleman |

La kunveno poste kooptis jenajn adminstrantojn:
Roland Rotsaert, Jules Verstraeten, Marcel Aerts, Gilbert Cardoen kaj Jean-Pierre Van den Daele.
Paul Peeraerts (direktoro de la centro), Guido Van Damme (redaktoro Horizontaal) kaj André Ruysschaert (prezidanto FLEJA) laŭofice aldoniĝas al la listo.
4. Elekto de la estraro kaj de la prezidanto: el la supraj administrantoj, elektiĝis unuanime jenaj estraranoj: Jean-Pierre Allewaert, Peter Berckx, Jan Bovendeerd, Ivo Durwael, Alex Humet, Roland Rotsaert kaj Jos Vandebergh.
Nur ID kandidatis por la prezidanteco. Ghilain Jacobs diris ke la manko de prezidanto dum 4 monatoj estis malbona afero. Li krome demandas, ĉu ID laŭstatute rajtas denove kandidati. PP klarigas ke la statutoj antaŭvidas maksimumon de 5 jaroj da seninterrompa prezidanteco, sed ke post interrompo de 1 jaro oni rajtas reelektiĝi. Ghilain fine rimarkas ke tro ofta apero de sama persono malhelpas la eblecojn por aliaj kandidatoj. ID elektiĝis poste kun 31 poraj voĉoj, 2 kontraŭaj kaj 1 sindeteno.
Sekvis paŭzo, dum kiu ĉiu ĉeestanta estrarano aŭ administrranto de loka grupo povis elekti librodonacon, kiel dankesprimo pro la farita laboro.
5. Memoriĝo Emile Cortvriendt: Emile Cortvriendt, membro de la honora komitato de FEL, forpasis en la lastaj tagoj de 1990. Edward Symoens, kiu persone bone konis lin, precipe inter '44 kaj '47, pentris bildon pri homo ekstreme postulema kaj samtempe ege ĉarma kaj kunsentema, tre praktika kaj samtempe sindediĉa por idealo. Li estis la motoro malantaŭ la Esperanto-radiokurso de la tiama NIR. Li ankaŭ estis la dinamismulo je la restariĝo de la Flandra Ligo Esperantista. Li postlasis belajn rememorojn de elstara Esperantisto!
6. FEL-vojaĝoj al Bergen: ID skizas la planojn kaj alvokas la klubojn por rapide diskonigi ĝin al eventualaj kongresontoj.
7. Alvoko Sossois: la prezidanto de APE ne povis ĉeesti, sed petis al ID transdoni alvokon. En Valonio, Georges Sossois insistas ĉe lokaj grupoj por kunveni ne laŭloke sed laŭfake: kunveno de poŝtmarkkolektantoj, de instruistoj ktp. Li petas al la kluboj de FEL por aliĝi al tiu ĉi iniciato. ID trandonas la subtenindan alvokon sed ankaŭ aludas antaŭajn malsukcesojn de tiaj eksperimentoj en Flandrio.

8. Subvencio de la kluboj: la estraro de FEL jam anoncis pli frue sian intencon por adapti la subvencion al la grupoj al la nova subvencipolitiko de la ministerio. Tio signifus ke grupoj ne plu ricevus parton de la kotizo, sed monkompenson pro pruvitaj aktivechoroj. Sed ĉar mankas ankoraŭ certeco pri la rezulto de la nova subvenciregularo de la ministerio, la estraro finfine proponas provizore konservi la malnovan sistemon. Se la ministerio efektive plialtigos la subvenciojn, tiam la grupoj ricevos sian parton proporcie al al pruvitaj aktivechoroj. Ĉiuj unuanime akceptas tiun ĉi proponon.
9. Honorigo Edward Symoens en Kalmthout: Wim De Smet mencias, ke la klubo de Kalmthout ekzistas 20 jarojn, kaj Edward Symoens, ĝia prezidinto, fariĝis 75-jara. Je la 25a de majo oni festos tion i.a. en la komunuma domo per honorigo de Edward Symoens kaj per varia tuttaga programo. Ĉiuj kluboj notu la daton kaj estu reprezentataj!
10. Horizontaal dulingva? Arpad Lödör esprimas sian bedaŭron ke Horizontaal ne aperigas Esperantlingvajn tekstojn. Ghilain Jacobs, Edward Symoens, Andre Ruysschaert, Lucien De Sutter kaj Katja Lödör, nome de la Progreso, subtenas la proponon per diversaj argumentoj, kaj faras eĉ proponojn pri la enhavo de tiuj tekstoj. Estiĝas vigla diskuto pri la celgrupo de la revuo. Alex Humet ankoraŭ atentigas, ke la demando neniam leviĝis antaŭe, sed ke nun subite, post renovigo de Esperanto-Panorama, venas aro da proponoj. Tio signifas, ke la adapto de nia revuo videble provokis novan interesiĝon pri ĝi. Fine de la debato interkonsentiĝis ke la estraro kune kun la redaktoro devos decidi pri la enhavopolitiko.
11. Rendevuejo de eksterlandanoj: Raymond Wylleman proponas telefonan reton por informi la klubojn pri vizito de eksterlandano. Sendube priesplorenda. Atendante konkretigon, ID petos al Jan Bovendeerd por publikigi la liston de jam kontaktitaj prelegantoj por la Internaciaj Vesperoj en Antwerpen en Informilo.
12. Tago de Internacia Amikeco: Kiu daŭrigos la tradicion? Kortrijk konsideros la eblecon por organizi ĝin en 1992, sed ne jam decidas. La malapero de la tradicio ne estus dramo, ĉar la iniciato komplete malaperis en aliaj landoj. Tamen la temo de Internacia Amikeco estas - laŭ la spertoj de Wylleman - populara por eksteraj kontaktoj.
Jos Vandebergh anoncas la "Limburgan Tagon": la 17an de aŭgusto en Tongeren.
13. Monato: André Ruysschaert havas serion da plendoj pri Monato, kiun li ilustras per ekzemploj: tro movadeca, eraraj informoj, malfrua apero, ekstera aspekto.
14. FEL kantu kaj dancu! Ghilain Jacobs bedaŭras la malaperon de dancado kaj kantado inter niaj Esperantistoj. Li alvokas por kantigi homojn en Esperanto-aranĝojn.
15. FLEJA: André Ruysschaert petas al la klubgvidantoj por konduki siajn junajn membrojn kaj kursanojn al FLEJA-aranĝoj, i.a. al la FLEJA-renkontiĝo de la 28a ĝis la 30a de junio.

Protokolis: ID.

## JARRAPORTO 1990.

Dum la pasintaj jaroj, la estraro de FEL jam diversfoje parolis pri la apliko de merkatado en nia asocio. Prave vi povus rimarki, ke vi ĝis nun apenaŭ malkovris konkretajn rezultojn. Mi vidas du kialojn: apliki merkatadon egalas al ŝanĝiĝo de pensmaniero, kaj tio bezonas multan tempon, precipe ĉar ni estas volontuloj; sed la ĉefa kialo estas, ke ni plurfoje parolis pri la teoria flanko, sed forgesis kune kun vi traduki tion en tre konkretajn farendaĵojn. Tial FEL organizos en la fino de aprilo studotagon por ekzerci la ellaboron de agadplano por loka klubo, surbaze de merkatado, sub gvidado de Kees Ruig.

Merkatado ĉefe okupiĝas pri la estonteco. Sed por montri al vi, ke temas pri relative simpla afero, mi mem (sola) provis apliki ĝin por raporti pri la aktivecoj de la pasinta jaro. Tio estu nur la demonstracio, ĉar normale merkatado estu skipa laboro!

Unua solvendaĵo estas akiri klaran ideon pri la celo de la agado. Ni ofte ne bone scias kion ni volas akiri, nek kiel kaj kial. Merkatistoj konsilas por vortigi sian celon meze sur granda papero. Supre ni plenigu la spacon per ripeta demando, kial ni volas atingi tion, ĝis ni ne plu trovas konvenan respondon.

Mi trovis jenajn respondojn:

CELO: disvolviĝo de Esperanto en Flandrio.

KIAL ni volas tion: Esperanto kontribuas al nia persona disvolviĝo; ju pli da adeptoj en nia ĉirkaŭaĵo, des pli grandaj estos niaj eblecoj.

KIAL ni volas adeptojn: individuo pli prosperas en harmonia grupo, kie bonvolo regas; ni volas manifesti la eblecojn de niaj ideoj kaj niajn organizajn kapablojn.

KIAL ni volas manifesti niajn kapablojn: por senti nin feliĉa, kontenta, gaja, plenenergia, ĉar eluzi siajn talentojn estas ekzistokialo por homo.

Tiu ĉi pensekzerco necesas por esti konsciaj, ke ĉiu ajn agado ne celu la progreson de Esperanto, sed ke <u>la progreso de Esperanto estu helpilo por nia persona disvolviĝo kaj feliĉo</u>. Tio validas por la organizantoj kaj por la klientoj!

Dua paŝo estas konkretigi tiujn dezirojn en agadojn, kiuj estas kiel eble plej konkretaj kaj tempe limigitaj, farante la demandon: kiel realigi ĉion; kien tiuj deziroj kondukos nin.

Ni, tio estas aktivuloj en 14 diversaj lokoj kune kun FLEJA kaj la estraro de FEL kaj la centro, provis realigi nian celon per agadoj sur la kampoj de Informado, Kursgvidado kaj Aplikado. Ĉar mankis plano, ni ne povas malkovri, ĉu ni realigis niajn celojn. Ni nur provas kiel eble plej konkrete raporti kaj laŭeble kompari kun la rezultoj de 1989 (inter krampoj).

INFORMADO:

Rilatoj kun la komunikiloj: ni registris 99 (114) gazeteltranĉaĵojn, sed kun malpli da mencioj: 8 (28) kaj pli da artikoloj: 91 (86). Precipe la nombro de la radioprogramoj kreskis 15 (1). Aldone estis 1 loka televidelsendo en Kortrijk kaj la mencio de la Esperanto rekordo en Oostende per VTM. Rimarkeblis pli da sukceso ĉe lokaj raportistoj ol ĉe centraj redakcioj.



La granda plimulto venis de lokaj kluboj. Ankaŭ en la centro oni dissendis iom regule komunikojn, sed laŭeble al lokaj ĵurnalistoj kun mencio de lokaj kontribuoj.
Pritraktitaj informpetoj en la centro: 248 (115).
Informaj budoj: 9.
Perpoŝta varbado al 1300 personoj. 20 mendoj de kursoj.
La laborplano de FEL antaŭvidis la dissendon de 4300 varbleteroj, sed post malbona sukceso de 2a kampanjo (0,4 %) oni hezitis refari ĝin.
La informmaterialoj de FEL pliampleksiĝis. En 90 realiĝis 3 novaj flugfolioj (por Eŭropa manifestacio, por anoj de Bond zonder Naam, pri Pasporta Servo) kaj 1 nova afiŝo. Aperis 1 nova Esperanto - dokumento (Psychologische reacties op het Esperanto). Ĉiuj antaŭaj materialoj ankoraŭ disponeblas.
Jen la kvantoj de la uzitaj materialoj:

| | | |
|---|---|---|
| Esperanto, tweede taal... | | 7100 |
| Esperanto, wat is dat | | 3000 |
| Flugfolio "Eŭropa" - presita 3000 | | 1100 |
| Flugfolio Horizontaal | | 4000 |
| Flugfolio Bond zonder Naam | | 1000 |
| Perpoŝta varbletero | | 1300 |
| E' Dok: | Esperanto vandaag | 188 |
| | Propedeutische waarde | 206 |
| | Esperanto, je vraagt maar | 266 |
| | Esperanto, Europese... | 127 |
| | Sociopolitieke .... | 52 |
| | Psycholigische reacties | 196 |
| Afiŝo: | Laat je verleiden | 455 |
| | Horizontaal - pres. 500 | 180 |
| Gluetikedoj, malgrandaj | | 5640 |
| | grandaj | 214 |

Haveblas en la libroservo novaj skribiloj kaj serio da donacobjektoj kun la vorto Esperanto.

KURSOJ:

Ĉar la plimulto de la kursoj finiĝas en la komenco de 90 kaj komenciĝas denove en la aŭtuno, la subaj ciferoj ofte rilatas al partaj kursoj. En la aktivecraportoj ni trovis:
31 kursojn por komencantoj
11 kursojn por progresantoj
10 konversaciajn kursojn

2 vaporkursojn
Tio reprezentas 54 (53) kursojn dum 1416 (1130) kurshorojn.
Tiu ĉi sumo ne enhavas la kursojn, kiuj okazis en la kadro de alia strukturo, i.a. la kursoj de la urbo Antwerpen kaj vaporkurso por tiuj, kiuj rifuzas militservon kaj kelkaj aliaj. Ĉi jare iris pli da atento al la junularo: ni menciu infankursojn en Lokeren kaj Oostende, junulkursoj en Kortrijk, Brugge, Aalst, Gent...
Krome oni vendis en la centro por memstudado:

| | |
|---|---|
| Esperanto-Programita | 74 |
| Kasedoj | 81 |
| Skatolo: libro+kasedo+vortaro | 19 |

APLIKOJ:
La 14 (14) lokaj kluboj organizis 129 (126) prelegojn kaj tio reprezentas 274 aktivechorojn. 24 prelegantoj estis eksterlandanoj.
Ili organizis 8 ekskursojn kaj 9 festojn.
Ne eblas nombri amason da vizitoj al diversaj en- kaj eksterlandaj Esperanto-aranĝoj, la gvidadon de centoj da eksterlandanoj kaj la instigojn al privata turismo pere de Esperantistoj.
La eldona agado estis impona:
Niaj 9 (9) revuoj : La Konko - 6x; Esperanto-aktuala - monata; Esperanto 2000 - 5x; La Pioniro - 5x; La Progreso - 6x; IEN - 6x (administrado kaj presado transiris de Belgio al Nederlando); Esperanto Panorama - 6x, 120 (96) paĝoj; Informilo - 9 (11)x; Monato - 12x, nombro da ekspeditaj ekz.: 2070 (1931).
La Krokodiletoj realigis 5 valorajn broŝurojn por uzo en la kursoj kaj en la infanfestoj.
La Manlibro por Esperanto-aktivuloj pliampleksiĝis per 48 (± 100) paĝoj;
La Jaro denove aperis en 1000 ekz.
En la centro eldoniĝis 6 (3) diversspecaj libroj: Internacia Kuirlibro - M. Becker, gastronomio; Grammaire ABC d'Esperanto - E. Van Damme + C. De Vleminck: La Akuzativo en Esperanto - D. Moirand, lingvistiko; 1887 kaj la sekvo - G. Waringhien, eseo; Dolĉe-amare - E. Van Damme, poezio. FEL ankaŭ distribuas la Hungaran Lingvokurson.



La libroservo disponis pri belaj dokumentujo kaj bondezirkartoj kun Esperanto-surskribo.
La membroj ricevis 10 %-an rabaton je aĉeto de 3 titoloj samtempe. Kluboj, kiuj mem organizis librostandon ankaŭ povas ricevi tiun ĉi rabaton.
La vendoj de la libroservo sumiĝis je 1.248.000 (798.000). Tiu grandega kresko venis precipe por tre sukcesa vendo de telekartoj kun Esperanto surskribo, la duobligo de la eldonitaj libroj kaj kvinobligo de la vendo de kursolibroj!
Krome la centro faris grafikajn laborojn por Esperanto-organizoj eksterlande kaj por neesperantistaj klientoj. Ili okupiĝis sume pri 28 diversaj revuoj kaj faris plej diversajn laborojn, de redaktado, kompostado, desegnado, enpaĝigado, presado, kunigado, forsendado, administrado. Sumo, enspezita pro neesperantistaj klientoj kreskis per 60 %.

Kvankam ne eblas mezuri, ĉu ni realigis nian celon (pro manko de klare difinita celo), ni jes konstatis mezureblajn progresojn kompare kun 1989. En miaj kontaktoj kun la klubgvidantoj, mi rimarkis ke la plimulto trovis kontentigon en sia agado kaj entuziasmis sed deziris precipe vivteni la aktivecojn sen iniciati ion novan. Ĉe kursanoj, mi malkovris pli da inklino por tuj apliki Esperanton en internaciaj kontaktoj.

Post tiu ĉi analizo de la celo, ni devus okupiĝi pri la CELGRUPOJ. Ĉi rilate FEL ankoraŭ ne havas politikon. La aktivecoj decidiĝas precipe pro personaj eblecoj, rilatoj kaj hazardaj cirkonstancoj. Ĝojiga estas la atento por la junularo (kp kun Kursoj). En la centro oni i.a. lanĉis la kampanjon Horizontaal (por studentoj) kaj kurson por tiuj, kiuj rifuzas militservon.

La tria parto de merkatplano konsistas el ekzameno, ĉu ekzistas harmonio en la elementoj de la "merkatmiksaĵo":
PUBLIKO: mankas politiko pri varbado ĉe difinitaj celgrupoj.

PRODUKTO: en nia informado ni evoluas pli kaj pli de idealismo al emfazo de praktikaj eblecoj. En 90 ni precipe emfazis la propedeŭtan valoron de Esperanto, pasportan servon kaj la eblecojn de kontaktoj en "neokcidentaj" landoj (Kubo, Orient-Eŭropo).
PREZO: plioftiĝas pagitaj kursoj. Tio ne malpliigis la nombron de lernantoj, sed pliseriozigis la kursojn.
PROFITO: la profito de la finstudintoj ankoraŭ tro limiĝas al la partopreno en klubaj aktivecoj. Pozitiva estas provoj por konduki kursfinintojn al eksterlandaj spertoj (precipe en Lokeren, Antwerpen kaj Gent).
PREZENTEJO: mi ne malkovris ŝanĝiĝojn.
PERSONARO: en la bilanco videblas, ke la proporcio de la FEL-aktivecoj fariĝis pli granda kompare kun la grafikaj laboroj por aliaj klientoj. Tio signifas, ke la personaro de nia centro sekve estas pli envolvita en FEL aktivecojn. Ĉar la jaro finiĝas per gajno, tio estas ege pozitiva evoluo. La laboroj de Pieter Vets, konsciencobjetulo, multe helpis al tiu ĉi evoluo.
Aliflanke, la nomoj de la volontuloj, kiuj agadas restis preskaŭ senŝanĝaj kaj tio signifas maljuniĝo.
PROPAGANDO: la vivteno de tiom da kursoj pruvas ke la kluboj celtrafe propagandis. Aldone FEL entreprenis 2 novajn iniciatojn, nome perpoŝtan varbadon kaj kampanjon Horizontaal. Tiu ĉi celis sisteme informi studentojn, ne per prezento de Esperanto sed de Pasporta Servo.

Resume, mi konstatis en ĉiuj eroj de tiu ĉi raporto kreskon aŭ almenaŭ konservon de la antaŭaj rezultoj. Tio estas kuraĝiga. Per la aplikado de merkatsistemoj ni provu labori ankoraŭ pli celtrafaj. Mi ne atendas miraklojn de tio, sed almenaŭ denove pli da rezultoj en 91 per la uzo de sama energio!

Ivo Durwael,
Sekretario

Flandra Esperanto-Ligo
vlaamse esperantobond v.z.w.

# ORGANIGRAMO

# 1991

## *HONORA KOMITATO*

†Emile Cortvriendt, Diepestraat 29, 2060 Antwerpen.
Tlf. (03) 232 44 30.
Gérard Debrouwere, Magdalenastraat 29, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 22 76 48.
Fernand Roose, Sinte-Klaradreef 59, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 34 30 61.
Edward Symoens, Putsesteenweg 151, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 62 66.
Cesar Vanbiervliet, Oudenaardsesteenweg 158, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 22 00 11.
Jules Verstraeten, Sint-Bernardsestwg. 1078, 2660 Hoboken.
Tlf. (03) 827 66 43.

## *ESTRARO*

Prezidanto:
Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem.
Tlf. (03) 440 30 92.
Sekretario:
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen.
Tlf. (011) 52 19 43.
Financoj:
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 33 00 04.
Instruado:
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Tlf. (03) 239 21 69.
Membroj:
Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 20 07 96.



Peter Berx, Klein Koosterstraat 17, 3570 Alken.
Tlf. (011) 31 26 20.
Jan Bovendeerd, Meidoorn 42 b2, 2640 Mortsel.
Tlf. (03) 449 50 06.

## *KOMISIITOJ*

Financoj:
Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
Eldona agado:
Chris Declerck, Gerrit Berveling, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.
Manlibro de la aktivulo:
Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee.
Tlf. (016) 20 14 53.
Gazetara servo:
Guido Van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.
Tlf. (03) 234 34 00.
Rebata servo:
Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 70 87 00.
Prelegvojaĝoj:
Hilde Van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst.
Tlf. (053) 70 50 11.

## *GRUPOJ - ADMINISTRANTOJ*

### ANTVERPENO

**La Verda Stelo**
Korespondadreso:
"La Verda Stelo", Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

Prezidanto:
Jan Bovendeerd, Meidoorn 42 b2, 2640 Mortsel.
Tlf. (03) 449 50 06.
Sekretario:
Clara Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem.
Tlf. (03) 440 30 92.
Kasisto:
Clara Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem.
Tlf. (03) 440 30 92.
Administrantoj de FEL:
Jan Bovendeerd, Meidoorn 42b2, 2640 Mortsel.
Tlf. (03) 449 50 06.
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Tlf. (03) 239 21 69.
Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem.
Tlf. (03) 440 30 92.
Eddy Van den Bosch, Kon. Astridplein 4, 9150 Kruibeke.
Tlf. (03) 744 00 48.

**La Erikejo**
Prezidanto:
René De Clerck, Past. Vandenhoudtstraat 13, 2950 Kapellen.
Tlf. (03) 664 39 63.
Sekretario:
Mireille Storms, Douglaslaan 14, 2950 Kapellen.
Tlf. (03) 666 83 19.
Kasisto:
Erhard Boehme, Plantinlaan 10, 2940 Stabroek.
Administrantoj de FEL:
Edward Symoens, Putsesteenweg 151, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 62 66.



## BRABANT

**Bruselo**
Prezidanto:
Emile van Damme, Albert I straat 44, 1703 Schepdaal.
Tlf. (02) 569 17 83.
Sekretario:
Christiane De Vleminck, Brugmannlaan 565, 1180 Brussel.
Kasisto:
Philippe Van Damme, Briljantstraat 21, 1170 Brussel.
Tlf. (02) 673 75 96.
Administrantoj de FEL:
Lucien De Sutter, Kersbeeklaan 90, 1190 Brussel.
Tlf. (02) 332 08 68.

**Esperanto 2000**
Prezidanto:
Carl Deseure, St.-Stefaanstraat 102, 1932 Zaventem.
Tlf. (02) 720 20 09.
Sekretario:
Bert Vanhoven, Boerenkrijglaan 20, 3120 Tremelo.
Tlf. (016) 53 58 92.
Kasisto:
André Wollants, Maleisenstraat 86, 3020 Herent.
Tlf. (016) 23 74 18.
Administrantoj de FEL:
Ghislain Jacobs, Kerkstraat 97, 3010 Kessel-Lo.
Tlf. (016) 26 19 63.
Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee.
Tlf. (016) 20 14 53.

**Halle**

Prezidanto:

Jan Devillé, J. Uylenbroeckstr. 127, 1500 Halle.

Tlf. (02) 356 45 17.

Sekretario:

Herman Deceuninck, Villalaan 1 b4, 1500 Halle.

Tlf. (02) 360 17 22.

Kasisto: Jan Devillé

Administranto de FEL: Jan Devillé

## LIMBURGO

**Limburga Esperanto-Ligo**

Prezidanto:

Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen-Helchteren.
Tlf. (011) 52 19 43.

Sekretario:

Marcel Aerts, Lazarijstraat 122, 3500 Hasselt.

Tlf. (011) 25 34 67.

Kasisto:

Albert Claesen, Zonnebloemstraat 13, 3590 Diepenbeek.

Tlf. (011) 32 36 03.

Administrantoj de FEL:

Peter Berx, Klein Koosterstraat 17, 3570 Alken.

Tlf. (011) 31 26 20.

Mathieu Habex, Gildelaan 27, 3600 Genk.

Tlf. (011) 35 95 42.

Gustaaf Rombaut, Zandhoefstraat 156, 3583 Beringen-Paal.

Tlf. (011) 42 80 20.

Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen-Helchteren.

Tlf. (011) 52 19 43.



**Hasselt**

Prezidanto:

Peter Berx, Klein Koosterstraat 17, 3570 Alken.

Tlf. (011) 31 26 20.

Sekretario:

Marcel Aerts, Lazarijstraat 122, 3500 Hasselt.

Tlf. (011) 25 34 67.

Kasisto:

Albert Claesen, Zonnebloemstraat 13, 3610 Diepenbeek.

Tlf. (011) 32 36 03.

**Genk**

Prezidanto:

Mathieu Habex, Gildelaan 27, 3600 Genk.

Tlf. (011) 35 95 42.

Vicprezidanto:

Hendrika Mandervelt, Gildelaan 27, 3600 Genk.

Tlf. (011) 35 95 42.

Sekretario:

Willy Minnen, Loskaaistraat 6, 3600 Genk.

Tlf. (011) 35 07 13.

Kasisto:

Willy Minnen.

**Beringen**

Prezidanto:

Jos Lemmens, Maasheidestraat 7, 3580 Beringen.

Tlf. (011) 42 26 36.

Sekretario:

Gustaaf Rombaut, Zandhoefstraat 156, 3583 Beringen-Paal.

Tlf. (011) 42 80 20.

Kasisto:
Gustaaf Rombaut.

## OKCIDENT-FLANDRUJO

### Paco kaj Justeco
Prezidanto:
André Dumarey, Blekerijstraat 32, 8310 Brugge-Assebroek.
Tlf. (050) 35 48 13.
Sekretario:
Roger Iserentant, Sint-Pieterskerklaan 59, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 31 50 64.
Kasisto:
Raymond Defrancq, Rietlaan 57, 8200 Brugge-St-Michiels.
Tlf. (050) 38 11 98.
Administrantoj de FEL: provizore mankas.

### La Konkordo
Prezidanto:
Jan Hanssens, Meiweg 23, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 21 31 06.
Sekretario:
Jan Hanssens
Kasisto:
Danielle Sabbe-Demeyere, Winterland 23, 8501 Kortrijk-Heule.
Tlf. (056) 35 55 35.
Administrantoj de FEL:
Jan Hanssens, Meiweg 23, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 21 31 06.
Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 20 07 96.



### La Konko
Prezidanto:
Raymond Wylleman, A. Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 50 27 08).
Sekretario:
Thérèse Boudt-D'Hulster, Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 80 06 95.
Kasisto:
André D'Hulster, Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 80 06 95.
Administranto de FEL:
Raymond Wylleman, A. Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 50 27 08).

### Knokke
Prezidanto:
Albert Marmenout, Helmweg 7, 8300 Knokke-Heist 1
Tlf. (050) 60 55 35.
Administranto de FEL: Albert Marmenout.

## ORIENT-FLANDRUJO

### Aalst
Prezidanto:
Erik D'Hondt, Wilgstraat 25A, 9320 Erembodegem.
Tlf. (053) 77 44 97.
Sekretario:
Hugo Dossche, Asserendries 103, 9300 Aalst.
Tlf. (053) 70 17 89).
Kasisto:
Clement Amant, Brakelstraat 52, 9300 Aalst.
Tlf. (053) 21 31 56.

Administranto de FEL:
Hilde Wauters, Gentsesteenweg 108, 9300 Aalst.

**La Progreso**
Prezidanto:
Katja Lödör, Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge.
Tlf. (091) 30 16 77.
Sekretario:
Ingrid Lievens, Oude Bareelstraat 10, 9041 Oostakker.
Kasisto:
René Budts, Verpleegstersstraat 154, 9000 Gent.
Tlf. (091) 22 37 98.
Administrantoj de FEL:
Ingrid Lievens, Katja Lödör.

## *KOOPTITAJ ADMINISTRANTOJ*

Marcel Aerts, Lazarijstraat 122, 3500 Hasselt.
Tlf. (011) 25 34 67.
Gilbert Cardoen, Violierenlaan 5, 894670 Wervik.
Tlf. (056) 31 26 29.
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 33 00 04.
Jean Pierre VandenDaele, Oostmeers 36, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 34 62 87.
Jules Verstraeten, Sint-Bernardsestwg. 1078, 2660 Hoboken.
Tlf. (03) 827 66 843.

## *ADMINISTRANTOJ-FUNKCIULOJ*

Paul Peeraerts, Baron Dhanislaan 13, 2000 Antwerpen.
Tlf. (03) 234 34 00 (dum oficejaj horoj)



André Ruysschaert, Ganzestraat 89, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 34 14 69.
Guido Van Damme, Haantjeslei 31, 2018 Antwerpen.
Tlf. (03) 234 34 00 (dum oficejaj horoj).

## *FLEJA*

Prezidanto:
André Ruysschaert, Ganzestraat 89, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 34 14 69.
Vicprezidanto:
Stefaan Cottenier, Bozestraat 108, 8710 Kortrijk-Heule
Tlf. (056) 35 33 30.
Sekretario: provizore ĉe Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.
Kasisto:
Eddy Van den Bosch, Kon. Astridplein 4, 9150 Kruibeke.
Tlf. (03) 774 00 48.
FEL-administranto: André Ruysschaert.
Estraranoj:
An Alberto, Henegouwenstraat 87/1, 9000 Gent.
Tlf. (02) 343 24 89 (dum oficejaj horoj).
Roberto Lemeire, Salviastraat 54, 3590 Diepenbeek.
Tlf. (011) 32 44 42.
Jan Vanuytven, Sanderusstraat 69, 2018 Antwerpen.
Pieter Vets, Wapenhaghestraat 19, 2600 Berchem.
TEJO-komitatanoj:
André Ruysschaert kaj
Ilse Jacques, Molenstraat 29, 2060 Antwerpen.
Tlf. (03) 237 15 67.

## *KUNLABORANTAJ ASOCIOJ*

Belga Esperantista Fervojista Asocio

Lucien De Sutter, Kersbeeklaan 90, 1190 Brussel.
Tlf. (02) 332 08 68.

Belga Ligo de Katolikaj Esperantistoj
Hubert Audenaert, Beekstraat 6, 9160 Lokeren.
Tlf. (091) 48 44 56.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Tlf. (03) 239 21 69.

Esperanto-Centrum Nederland
ECN, Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando.
Tlf. 00 31 (70) 55 66 77.

Association pour l'Espéranto (APE)
Prezidanto: Georges Sossois
79 rue du Basson, 6001 Marcinelle. Tlf. (071) 43 62 05.
Sekretario: Simonne Fichefet
rue J. Destrée 104, 6043 Ransart. Tlf. (071) 35 46 87.
Kasisto: Marcel Delforge

Belga Esperanto-Federacio (BEF)
Prezidanto: Georges Sossois
Vicprezidanto: Monique Caestecker
Sekretario: Philippe Van Damme Kasisto: Marcel Delforge

Korespondadreso APE/BEF
Marcel Delforge, 16 rue des Glacijres, 6001 Marcinelle.
Tlf. (071) 43 14 13.

Informoj pri planataj aktivecoj sendu al
Philippe Van Damme, Briljantstraat 21, 1170 Brussel.
Tlf. (02) 673 75 96.